

AMERIKA  
ESPERANTISTO

La Monata Bulteno  
de la Esperanto  
Asocia de Norda  
Amerika



The Monthly  
Bulletin of the  
Esperanto Association  
of North America

AMERICAN  
ESPERANTIST

Joseph R. Scherer, President  
Los Angeles, California.

Joseph Leahy,  
General Secretary,

James F. Morton, Vice-President  
Paterson, N. J.

Centra Oficejo — 1517 H Street, N. W., Washington, D. C. — Central Office

VOLUME 49 No. 6 — \$ 1.00 per Year — APRIL 1936

MARK THE DATES ON YOUR CALENDAR — DETROIT JULY FIRST SECOND and THIRD

1 9 3 6 — 29th ANNUAL CONGRESS E.A.N.A. — 1 9 3 6



# AMERICAN ESPERANTO SONG-BOOK PART ONE



This month's issue of Amerika Esperantisto turns aside from its usual appointed path -- except for two pages of news and notices -- in order to place in our readers' hands one half of the song-book which the talent of Mr. H. I. Keyes of (Uniontown, Pa.), brought into being in 1930 and 1931, at the specific request of an E.A.N.A. Congress. Circumstances have not previously been opportune for the publication. But now we are happy to find place for these songs in our regular pages. The remainder of the collection must wait for some later issue, after the 1936 Detroit "Kongreso", and the reporting of its high lights to our readers, shall have held right of way for a few months.

Songs in nia lingvo, socially sung, give life to any Esperantist gathering. And also the izolulo may join in spirit by committing his favorite song-words to memory and humming them as he goes his way. That you will carefully preserve your copy of this collection requires no mention.

Extra copies of the present issue may be secured postpaid at 15¢ for one, or 10¢ each in lots of five or more to one address.

## LA AMERIKA ESPERANTO-KANTLIBRO

VERKITA DE-H. I. KEYES.

### - - ANTAŬPAROLO - -

Tio ĉi estas esence kantlibro, ne literaturaĵo. Troviĝas en Esperanto nemultaj vortoj el unu silabo per kiuj oni povas fini verson (linion). Tial la versisto devas: aŭ anstataŭigi la nomon finiĝon o per apostrofo; aŭ trouzadi la pronomojn personajn. Mi prefere uzadas la pronomojn.

Ĉe nomoj la apostrofo konfuzas la okulojn kaj malhelpas la komprenon. Ĝi povas, ofendi la orelojn kaj tro ekzerci la voĉon. Kompense ĝi ne tre plilarĝigas la teknikan kampon de la versisto; ĉar ĝi aplikas nur al ununombraj nomoj en la nominativo. Lingvaĵo povas esti samtempe laŭregula kaj nedezirinda aŭ nepoezia. Apostrofo ĉe la artikolo ne kreas komplikon. Ekzistas nur sola artikolo kaj ĝi nepre bone kombiniĝas kun la apuda prepozicio laŭ senco kaj sono.

Kiam la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko, kongrese sidante en Annapolis en 1916 a, nomis min Poeto Laureato, mi akceptis la honoron kaj respondecon. Sekve, kiam tiu Asocio, kongrese sidante en Milwaukee, petis min pri kantlibro, ĝia peto estis por mi ordono.

Jen la kantlibro. Ĝia enhavo konsistas el kaj tradukaĵoj kaj originalaĵoj. Sed ĉiu melodio estas bone konata kaj temprovita. La Kantoj estas multspecaj — de sencencaj, festaj, kaj propagandaj, tra la gamo de sentoj kaj sentimentoj ĝis la seriozaj, religiaj, kaj tragediaj.

Samideane,

Uniontown, Penna., 1931.

H. I. Keyes.

(1) Melodio---Battle Hymn of the Republic

1. Ho, longe vivu Esperanto---longe vivu ĝi!  
 Kaj la Esperantistaro kresku nombre pli kaj pli,  
 Ĝis kun tuta la homaro egalnombraj estos ni---  
 Ho hura, hura, ho!

(Rekantaĵo.)

Longe vivu Esperanto!  
 Longe vivu Esperanto!  
 Longe vivu Esperanto!  
 Ho hura, hura, ho!

2. Progreso nia ĝis la nuno kuraĝigas nin;  
 Kiel helpa lingvo, Esperanto jam rajtigas nin;  
 Jes! Kaj post-nelonge nia mondo alproprigos ĝin---  
 Ho hura, hura, ho!

(2) Melodio---

"Oh, Where is My Highland Laddie Gone?"  
 (Blue Bells of Scotland.)

1. Ho kie, ho kie rerenkontigos ni?  
 Ho kie, ho kie rerenkontigos ni?  
 Okazo post-nelonge al ni prezentos sin---  
 La proksima kongreso---ni ne forgesu ĝin.

2. Ho kiel, ho kiel veturos ni al ĝi?  
 Ho kiel, ho kiel veturos ni al ĝi?  
 Piede---flugmaŝine---aŭ kiel povas ni---  
 Sed nenio devigu nin resti for de ĝi!

3. Ho kial, ho kial vojaĝos tien ni?  
 Ho kial, ho kial vojaĝos tien ni?  
 Ni tien iros ĉar ĝi ne venos tien ĉi!  
 Jes, ni iros al ĝi, ĉar ne venos ĝi al ni!

4. Ho kion, ho kion plenumos tie ni?  
 Ho kion, ho kion plenumos tie ni?  
 Plenumos nian devon al Esperanto ni---  
 Ja indega je nia subteno estas ĝi.

5. Ho kiun, ho kiun revidos tie ni?  
 Ho kiun, ho kiun revidos tie ni?  
 La gesamideanojn kredeble vidus ni---  
 Sed, se ne, la vojaĝo repagos nin per si.

6. Ho kiom, ho kiom da kosto havos ĝi?  
 Ho kiom, ho kiom da kosto havos ĝi?  
 Kompare kun valoro, ja kosto ĝi malpli  
 Ol aliaj objektoj por kiuj spezas ni.

(3) Melodio---

"Ach, du Lieber Augustin."

1. Jen la Verda Stelo---  
 Saluton! saluton!  
 Saluton al la Stelo---  
 Saluton al ĝi!

(Rekantaĵo.)

La Stelo! la Stelo!  
 La Verda Standardo!  
 Saluton al la Stelo---  
 Saluton al ĝi!

2. Gesamideanoj,  
 Saluton! saluton!  
 Ho, gesamideanoj,  
 Saluton al vi!

3. Vivu la Afero!  
 Ĝi vivu! ĝi vivu!  
 Ho, vivu La Afero---  
 Triumfon al ĝi!

(4) Melodio---

"Good Night, Ladies."

1. Bonan nokton!  
 Bonan nokton!  
 Bonan nokton!  
 Ni vin forlasas nun!

(Rekantaĵo)

Rulvojaĝe iras ni,  
 Iras ni, iras ni;  
 Rulvojaĝe iras ni  
 Super la blua mar'!

2. Nun adiaŭ!  
 Nun adiaŭ!  
 Nun adiaŭ!  
 Ni vin forlasas nun!

3. Dolĉajn songojn!  
 Dolĉajn songojn!  
 Dolĉajn songojn!  
 Ni vin forlasas nun!

4. Ĝis revido!  
 Ĝis revido!  
 Ĝis revido!  
 Ni hejmeniros nun!

(5) Melodio---Listen to the Mocking Bird.

1. Ni laŭdas vin, Esperanto, Esperanto, Esperanto;  
Ni laŭdas vin, Esperanto.  
Kaj al vi tutkore ni dediĉas nin.  
Vi estas bon-helpanto, bonhelpanto, bonhelpanto;  
Vi estas bon-helpanto,  
Kaj kun lojaleco ni subtenos vin.

(Rekantaĵo.)

Esperanto, vivu vi! Esperanto, vivu vi!  
La mondo, kiel ni, akceptu vin!  
Esperanto, vivu vi! Esperanto, vivu vi!  
La mondo, kiel ni, akceptu vin!

2. Servadas vi al homaro, al homaro, al homaro;  
Servadas vi al homaro,  
Kaj al si la mondo baldaŭ prenos vin.  
Foriĝas nun ĉiu baro, ĉiu baro, ĉiu baro;  
Foriĝas nun ĉiu baro---  
Vi al interkompreniĝo gvidas nin.

(6) Melodio---My Bonnie  
("My Bonnie lies over the ocean.")

1. Transiris mi la oceanon---  
Sur ŝipo vojaĝis sur ĝi;  
Renkontis mi nek samlandanon  
Nek iun konatan de mi.

(Rekantaĵo.)

Es-per-an-to estas la lingvo por mi, por mi;  
Es-per-an-to estas la lingvo por mi.

2. Mi ne amuziĝis per io.  
Neniu parolis al mi;  
Enuis mi baldaŭ je ĉio---  
Soleco min prenis al si.
3. Bonŝance U. E. A. butono  
Atenton altiris al si;  
La stelo kun neĝ-blanka fono---  
Ho, kiel mi ĝojis pri ĝi!
4. Min tuje enuo forlasis,  
Soleco forflugis kun ĝi;  
Kaj gaje la horoj forpasis  
Por samideano kaj mi.

(7) Melodio---  
"Onward Christian Soldiers."

1. Iru ni antaŭen,  
Ne laciĝu ni;  
Venko nin atendas---  
Marŝu, do, al ĝi!  
Klara nun la vojo  
Kiel "A, Bo, Co"---  
Kun venkremo ĝis ekstremo  
Bataladu, do!

(Rekantaĵo.)

Iru ni antaŭen,  
Ne laciĝu ni;  
Venko nin atendas---  
Marŝu, do, al ĝi!

2. Paco kaj utilo---  
Tio ja per si  
Estas batalilo  
Kiun uzos ni;  
Se malhelpa forto  
Kontraŭstaros nin,  
Ĉiuhore, perlabore  
Ni forigu ĝin!

(8) Melodio---  
"When Johnnie Comes Marching Home."

1. Renkonte ni venas tien ĉi---  
Ho, hura ho!  
Renkonte ni venas tien ĉi---  
Ho, hura, ho!  
Renkonte ni venas tien ĉi---  
Sam-ideanoj estas ni---  
Ni salutas kore unu alian nun!
2. La Esperantismo regas nin---  
Ho, hura ho!  
La Esperantismo regas nin---  
Ho, hura ho!  
La Esperantismo regas nin---  
Kaj simpatio vekas sin;  
Kaj ni bone konas unu alian nun!
3. Disiĝe ni baldaŭ iros for---  
Ho ve! ho ve!  
Disiĝe ni baldaŭ iros for---  
Ho ve! ho ve!  
Disiĝe ni baldaŭ iros for,  
Farinte kion ni venis por---  
Do ni adiaŭu unu alian nun.

(9) Melodio--Portuguese Hymn  
 ("How Firm a Foundation.")  
 . . . . .

1. La Majstro! La Majstro! Honoron al li--  
 Al li kies ardo inspiras al ni;  
 Sub Verda Standardo dediĉu ni nin  
 Al lingvo neŭtrala---starigu ni ĝin!  
 Al lingvo neŭtrala---starigu ni ĝin!
2. Kurage ni iru la vojon kun li---  
 Kun li kies paŝoj ne haltis sur ĝi!  
 "Antaŭen! Antaŭen!" sonigu ni ĝin  
 Ĝis tuta la mondo al ni ligos sin!  
 Ĝis tuta la mondo al ni ligos sin!
3. Lojale ni restu kunsentaj kun li---  
 Ni vidu la celon kaj iru al ĝi;  
 Ni arde laboru ĝis trafos ni ĝin---  
 Pro bono homara oferu ni nin!  
 Pro bono homara oferu ni nin!

(10) Melodio---  
 Rubinstein's Melody in F.  
 . . . . .

1. Ho, kiel kare mi pensas pri ĝi---  
 Pri la malgranda surmonta domo,  
 Naskloko kaj hejmlogejo por mi  
 En tagoj pasintaj for!  
 Ofte, dormante, mi songas pri la loko,  
 Ofte alvenas al mi kvazaŭa voko:  
 "Ho, vi forestanto! Revenu, vaganto!  
 Revenu---jen kio vi serĉadas por!"

(Rekantaĵo.)

- Ho, kiel kare mi pensas pri ĝi---  
 Pri la malgranda, surmonta domo,  
 Naskloko kaj hejmlogejo por mi  
 En tagoj pasintaj for!
2. Kion mi trovas serĉinda por mi?  
 Oron? argenton? gemojn? juvelojn?  
 Ili ne havas valoron per si  
 Kaj ne kontentigus min.  
 Juvelojn povas fabriki ni el oro;  
 Sed ili ne altvaloras por la koro;  
 Kontento! ho vi estas gemo por mi,  
 Tra tuta la mondo mi elserĉas vin!

(11) Melodio---Schubert's Serenade.  
 (Solaĵo kun fortepiano.)  
 . . . . .

- Nokto venas, kaj la ombroj  
 Antaŭsignas ĝin;  
 Sur ĉielo, jen la suno  
 Jam mallevas sin;  
 Malproksima sonorado  
 Venas nun al mi---venas nin al mi;  
 Jen birdeta noktkantado---  
 Eĥe sonas ĝi---eĥe sonas ĝi!
- En lunlumo, dorma mondo  
 Lukse banas sin;  
 La spiranta nokta vento  
 Flustra lulas ĝin.  
 Dolĉe vokas najtingalo---  
 Kante plendas ŝi---kante plendas ŝi,  
 Sub nebula noktvualo,  
 Kiel plendas mi---kiel plendas mi!  
 La pasio, kiel flamo  
 Brulas en la kor'---  
 Per flugiloj de la amo,  
 Ni forflugu for---  
 Ni forflugu for---  
 Ni forflugu for!

(12) Melodio---How Can I Leave Thee?  
 . . . . .

1. Kiel foriri? Kiel forlasi vin  
 Kiam la pensoj min ligas al vi?  
 Batas la koro por  
 Vi se mi restas for---  
 Vivi sen vi -- estos  
 Morto por mi.
2. Sub la folioj, floroj trovadas sin---  
 Ilin alprenu, kaj pensu pri mi.  
 Mi ne forgesos vin---  
 Vi ne forgesu min!  
 Mondo sen vi -- estus  
 Nula por mi!
3. Birdajn flugilojn---ilin se havus mi,  
 Spite la falkoj mi flugus al vi.  
 Se sago trafus min---  
 Trafus mortige min---  
 Tiam, mortante, mi  
 Pensus pri vi.

(13) Melodio--Maryland, My Maryland.

1. Ni renkontiĝas tie ĉi,  
La la-la, la, la la-la.  
De multaj lokoj venas ni;  
La la-la, la, la la-la.  
Ni multon fari venis por,  
Kaj antaŭ ol ni iras for,  
Triumfe ni gratulos nin:  
"La celon---jam ni trafis ĝin."
2. Irinte for de tie ĉi,  
La la-la, la, la la-la,  
Pli esperemaj estos ni;  
La la-la, la, la la-la.  
Entuziasmo vekos sin,  
Kaj dum ni partoprenos ĝin,  
Kantados ni la tagoj tra:  
"La la-la, la, la la-la."

(15) Melodio---Auld Lang Syne.

1. La eta, krudaspekta domo  
Kie loĝis mi  
En tagoj de la vivprintempo---  
Kara estas ĝi.  
Ho, tiu domo! rememore  
Ĝi prezentas sin  
Kun la loketoj kaj la ĉarmoj  
Ĉirkaŭantaj ĝin.
2. Parencojn kaj amikojn miajn  
Nun revidas mi;  
La kvazaŭ-vera bildo---kiel  
Klara estas ĝi!  
Neniam, rigardante ĝin,  
Enuas mi---ne, ne!  
Ja kvankam ĝi estigas min  
Florema---ve, ho ve!

(14) Melodio--Old Folks at Home.  
(Suwanee River.)

1. Al vi, rivero Suanio,  
Sopiras mi;  
Kun koroplana emocio  
Revas mi nun pri vi.  
Mi, vagadante tra la mondo,  
Pripensas vin,  
Kaj songas pri la hejma rondo  
Kiu dorlotis min.

(Rekantaĵo.)

Ho, nenio en la mondo  
Nun ĝojigas min;  
Ne plu la familia rondo  
Sur tero trovas sin.

2. Ho, kiam estis mi junulo,  
Ludadis mi  
Sub viv-ĉielo sen nebulo---  
Jam nuba estas ĝi.  
La frato---kie nun li estas?  
Ho, kie li?  
Patrino mia---ĉu ŝi restas?  
Ne, ne---forpasis ŝi.
3. Dometo inter arbetoj---  
Ja restos ĝi  
Per ĉiam kara memoraĵo,  
Kie troviĝos mi.  
Denove ĉu abela zumo  
Dormigos min?  
Ĉu bangoj en la lunolumo  
Vekos muzike sin?

(16) Melodio---La Lorelei.

1. Facila venteto somera  
Karese blovas al mi;  
Ĝi venas de loko mistera  
Portante ŝargon kun si.  
El florparfumitaj loketoj,  
Flugvenas ĝi tien ĉi,  
Kaj flustras pri siaj sekretoj  
En la orelon al mi.
2. Ŝipeton kun ventplenaj veloj  
Image naĝas sur ĝi;  
Kaj miraj fe-landaj kasteloj  
Ekvidebligas por mi.  
"La ŝipo," raveme mi miras,  
"Ho kiu estas ĝi por?"  
"Por vi!" la venteto eldiras,  
Kaj blove portas min for.
3. Trairas mi tra regionoj  
En lando fremda por mi;  
Sorĉado!---la formoj kaj sonoj!  
Ho, kion pensi pri ĝi?  
Dometo, kvazaŭa juvelo,  
Atenton tiras al si,  
Kaj jen "hispanuja kastelo"  
Starigas sin antaŭ mi!
4. Nur povas la nokto sciigi  
Al la animo al mi,  
Ke ĝi trankviliĝu por ligi  
En unu, la bildojn en ĝi.  
La lando vizia fandiĝas---  
Vekiĝas mi sub la lun!  
Kaj mia songlando ŝanĝiĝas  
En Tie Ĉi kaj La Nun!

(17) Melodio---Annie Laurie.

1. Mi nomas vin diino---  
 Pli ĉarma estas vi,  
 Ho mia karulino,  
 Ol ĉiu ajn por mi.  
 Aminda estas vi,  
 Kaj belo kronas vin--  
 Via ĉarmo, karulino,  
 Venkeme sorĉas min.
2. Ho, kiam, maldormante,  
 Meditas nokte mi,  
 La pensoj, vagadante,  
 Direktas sin al vi;  
 Direktas sin al vi,  
 Kaj ne reiras for---  
 Por eterne, karulino,  
 Vin tenos mia kor'.
3. Ho se vi sola restas,  
 Ne vere solas vi;  
 Spirite mi ĉeestas  
 Kaj staras apud vi.  
 Mi staras apud vi;  
 Rajtigas amo min---  
 Tra la jaroj ĝis la morto,  
 Mi ne forlasos vin.

(18) Melodio--Massa's In the Cold Ground

1. Sur la kampoj resonadas  
 Ĝemegoj kun; "ho ve!"  
 Mokobirdoj rekantadas:  
 "Ne malĝoju; ne, ho ne!"  
 Kie rampas la hedero,  
 (Korpon kovras ĝi)  
 Plore sonas en aero:  
 "Mastron ne revidos ni!"  
  
 (Rekantaĵo.)  
  
 En la plantejo sonas: "Ve, ho ve!"  
 Mokobirdoj eĉe kantas:  
 "Ne malĝoju; ne, ho ne!"
2. Mastron amis la servantoj---  
 Ho, bona estis li;  
 Ili estas nun plorantoj---  
 Morto prenis lin al si.  
 Ne laboras mi; mi volas  
 Pensi nur pri li;  
 Min la bango ne konsolas;  
 Povas nur funebri mi.

(19) Melodio---Yankee Doodle.

1. Ridu, ridu---ho,ho,ho!  
 Plorado estas vana;  
 Tutkore ridu---ho,ho,ho!  
 Kaj ĉiam restu sana.  
  
 (Rekantaĵo.)  
 Ha, Ha, Ha! kaj ho, ho, ho!  
 Foriru vi, malĝojo!  
 Iru---kaj ne estu tro  
 Haltema sur la vojo!
2. Kantu, kantu---la, la, la!  
 Kantado estas bona;  
 Ni gaje kantu---la, la, la!  
 Sed estu ĝi belsona!
3. Ne ploradu--ne, ne, ne!  
 Sed estu vi gajema;  
 Por vi la mondo ridos, se  
 Vi estos esperema.

(20) Melodio---America.

Usono, jen al vi  
 Lojalon ĵuras ni---  
 Ni amas vin;  
 Kore kantlaŭdas pri  
 Via majesto ni;  
 Vi estas pova, vi  
 Protektos nin!

(21) Melodio---  
 "The Last Rose of Summer."

1. Lasta rozo somera,  
 Solfloras nun vi;  
 Ĉiu via kunulo---  
 Forvelkis jam ĝi.  
 Parenco ne floras;  
 Nek burĝono per si  
 Vian belon reflektas  
 Konsole al vi.
2. Mi ne lasos vin sola---  
 Ja fidu vi min;  
 La belaj jam dormas,  
 Dormigos mi vin.  
 La viajn foliojn  
 Disĵetas jen mi  
 Kie samĝardenanoj  
 Kunkuŝos kun vi.

(22) Melodio---Blue Bells of Scotland

1. Ho, kie sin trovas karulo mia nun?  
Ho, kie sin trovas karulo mia nun?  
Por bataladi por sia reĝo iris li---  
Mia koro lin vokas reveni tien ĉi.
2. Ho kie, ho kie ĉeĥejme loĝas li?  
Ho kie, ho kie ĉeĥejme loĝas li?  
La hejmo---en Skotlando antaŭe estis ĝi;  
Lian longan foreston korpreme sentas mi.
3. Ho kian kaj kian vestaĵon portis li?  
Ho kian kaj kian vestaĵon portis li?  
Kun bela verda ĉapo, skot-ŝalon portis li  
Kaj pri lia feliĉo maltrankviliĝas mi.
4. Supozu ke morto alprenus lin al si?  
Supozu ke morto alprenus lin al si?  
Sonadus sakfajfiloj funebre super li---  
Sed la morto neniam lin prenus for de mi!

(23) Melodio---Old Black Joe.

1. Tagoj de ĝojo forflugis for de mi---  
Miajn amikojn prenante for kun si;  
Vokis Ĉielo, kaj ili aŭdis ĝin---  
Kaj nun iliaj anĝelvoĉoj vokas min.

(Rekantaĵo.)

Mi venas, mi venas!---la kapo klinas sin,  
Kaj la amikaj anĝelvoĉoj vokas min.

2. Ne dolorante, ho kial ploras mi?  
Ĉar jam ne restas amikoj tie ĉi;---  
Ĉiu foriris---la morto prenis lin,  
Kaj nun iliaj anĝelvoĉoj vokas min.
3. Kien la ĝojo foriris for de mi?  
Koroj amataj forprenis ĝin kun si---  
Al luma bordo jam ili portis ĝin,  
Kaj nun iliaj anĝelvoĉoj vokas min.

(24) Melodio--Red, White, and Blue.  
("Columbia, the Gem of the Ocean.")

1. Ho, triumfon al Nia Afero---  
La kronon de venko al ĝi!  
Helplingvo ĝi estas laŭ vero---  
Naciojn ĝi tiras al si.  
Uzantoj ateston disdonas  
Ke indo troviĝas en ĝi;  
Kaj---tiel alloge ĝi sonas!---  
Ĝi tiros la mondon al si.

(Rekantaĵo.)

La kronon de venko al ĝi!  
La kronon de venko al ĝi!  
Ho!---tiel alloge ĝi sonas!---  
Ĝi tiros la mondon al si.

2. Jen milito kun batoj kaj perdo  
Minacas la landon al ni;  
Standardo el blanko kaj verdo  
Leviĝas---ho hura por ĝi!  
Simbolo de interkompreno,  
Ĝi vokas armeon al si---  
Armeon kun paca sinteno---  
Por venki militon por ĝi!

(25) Melodio--Lead, Kindly Light.

1. Min tra nebuloj, Lumo, gvidu Vi---  
Konduku min;  
En noktmallumo erarvagas mi---  
Konduku min!  
Lo vojon montru---povas vidi mi  
Nur paŝon, sed por mi sufiĉas ĝi.
2. Antaŭe mi ne preĝis Vin ke Vi  
Konduku min;  
Elekti vojon tiam volis mi---  
Nun gvidu min!  
Memvolon, spite timo, amis mi;  
Fieris mi---kompaton sentu Vi!
3. Longtempe Via povo benis min---  
Min ŝildis ĝi;  
Dangĝeron ian---mi ne timas ĝin---  
Vin fidus mi.  
Ne plu mi vane sopiradas por  
Trankvilo, kiu longe restis for.

ESPERANTO PRESS SERVICE - Received the following letter from Woodruff W. Bryne, Director of the American Office of the TUTMONDA GAZETSERVO - recently established News Service:

"I am happy to report the first item to be published in the United States (so far as I know) over our name. It appears in the March issue of "STAMPS", page 334. The article, about a new commemorative stamp issue, came to us from Sweden. The Danish paper, THISTED AMTS TIDENDE, carried an article in January written by our reporter in Washington, S-ro Hugh L. Shatford. Samideanoj in this country can help Esperanto Press Service greatly by sending us clippings of our articles whenever they run across them. Perhaps certain members of EANA would like to volunteer to act as reporters for this service. If so, I shall be glad to have them write to me for details. Our ambitious program, because of its scope, will necessarily be slow at first; but it will gather headway as we work steadily toward our goal - to make America Esperanto-conscious. Tutkore via - Woodruff W. Bryne, 211 Washington St., Atlanta, Ga.

29-a NACIA ESPERANTO-KONGRESO de E A N A en DETROIT, JULIO 1, 2, kaj 3 1936 - En ĉi tiu numero vi trovas specialan invit-leteron de la kongresa komitato. Ni rakontas al vi staton de niaj ĝisnunaj aranĝoj. Ni povas konstati, ke la programo ĝenerale estas konstruita kaj se malhelpaĵoj ne okazos, ni jam scias, ke niaj kongresvizitontoj ĝuos tagojn da ĝojoj kaj memoro. Kvankam ni kunvenos por trovi novajn vojojn por konstrui pli grandan kaj fortan organizon nian, ni komitatantoj volas fari ĉion por faciligi kaj beligi ĉi tiujn tagojn kaj forpreni iomete la grandan pezon de la ŝultroj de la vizitanta konsilantaro. Denove mi demandas al vi, ĉu vi povas utiligi vian talenton - muzika, artista aŭ socia-por beliga niajn kongres-tagojn? Jam kelkaj samideanoj respondis nian alvokon kaj promesis ilian helpon iamaniere. Ĉu vi povas esti aktiva aŭ ĉu vi havas ideon similan, skribu pri tio al la sekretario de la kongresa komitato hodiaŭ. Ne perdu tempon. Ne kreu, ke via parto eble ne estas grava aŭ ne sufiĉa. Pripensu, ke ni volas esti unu granda familio eĉ nur kelkajn tagojn dum kiuj ĉiu el ni estas devigata alporti parton da ĝojoj kaj feliĉo.

Adresu: - Erich Kavel, 7609 Nevada Avenue, Detroit, Michigan.

La Suno, revuo pacifista kaj organo por infanaj interamikigoj estas senpaga al ĉiu samideano. Petanto skribu nepre kun klara kaj legebla adreso al - S-ro J. Ogasaŭra, Tojohara - ŝo, Ŭakajama - ŝi, Japan.

U. S. Representative Carl Stefan, Nebraska - was guest speaker at the third anniversary of the opening of United States Capitol Esperanto classes, under the Dome of the Capitol. He told of some very amusing incidents due to language difficulties, during his world travels, notwithstanding the fact that he is quite fluent in several languages. Noted that Esperanto is the only auxiliary language to have attained world wide recognition by governments, scientific, educational and industrial interests, and is quite confident that it will be the ONLY auxiliary language used in the near future.

Capitol classes meet Wednesday and Friday evenings in Page's class rooms. H. B. Hastings is the teacher.

Generalo Bastien (Parizo), Prez. de UEA sentas la devon doni al la vidvino de direktoro Kreuz modestan mon-donacon. Sed ĉar UEA ne estas sufiĉe riĉa li faras alvokon al la tutmonda samideanaro. S-ro Kreuz oferis sian vivon al Esperanto kaj mortis kiel martiro de tro-laboro. Ĉiu usona samideano kiu deziras helpi, povas sendi ĉekon al la Centra Oficejo de EANA en Washington.



UNITED STATES GOVERNMENT in response to an invitation from the Austrian government will be represented at the Universal Esperanto Congress, to be held in Vienna, August 8-15-'36. Mr. Fred A. Hamann, Wauwatosa, Wisconsin, Teacher, author and publisher has been appointed as representative. We know of no one better qualified for the honor. He is an accomplished linguist, writer and world traveler, and having attended several National and World Congresses, he knows his way about. Congratulations to U S A, Austria, EANA U E A and Fred A. Hamann.

X\*X  
IS YOUR PRONUNCIATION CORRECT? Learn to pronounce Esperanto correctly with the new "HOME-STUDENT" RECORDS. Six in an album, giving the pronunciation of most of the exercises in the "Esperanto Home Student". These records are unbreakable, durable and long-playing. Price postpaid \$3.60 - book 20¢. American Esperanto Institute, 556 State Street, Madison, Wisconsin.

X\*X  
PAINLESS ENROLLMENT - If a whole dollar and a half looks like too big an outlay all at once, drop 5¢, 10¢, or 25¢ into a box, etc., occasionally - per week. You'll be surprised how soon - and easily you will have enough to renew or become a member of the EANA-U EA. ALSO, IN SAVING UP FOR THE DETROIT CONGRESS - OH BOY! and note the DATES - J U L Y 1, 2 and 3, 1936.

X\*X  
ESPERANTO EMBLEMS. Green Star with Golden "E" in center. A unique feature is the Golden Ball Protectors on Star Points - eliminating all danger of injury. Emblems are of same type as expensive fraternal buttons selling for a \$ or more. Price we offer them for is due to our desire to see the Green Star worn proudly by every Esperantist. - Screwback, for lapel 40¢, Security pin 50¢. Order from Central Office E A N A.

X\*X  
NECROLOGY. The sympathy of the Esperanto world goes out to Dr. E. D. Chase of Galvesto, Texas, who recently lost his wife.

X\*X  
The MENA, Arkansas, Evening "Star" of March 19, carries a six inch article on Esperanto, contributed by our Fervorulo Capt. F. A. Post. Always on the job for Nia Afero.

X\*X  
NASKIĜO. Plezure ni ĵus aŭdis la ĝojigan novaĵon pri la alveno en tiun ĉi mondo de novfilineto, marto 18-an, ĉe la ĵejmo de Gesinjoroj Jozefo H. Murray (Prezidanto de Detroit Esperanto Societo). Ni kore gratulas ilin.

X\*X  
EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA  
X\*X  
Esperanto Association of North America. 1517 H Street, N. W., Washington, D. C.

MEMBERSHIP RATES - FIXED AT 28th CONGRESS

- Class I - Membership in EANA and U E A, with "Amerika Esperantisto" . . . . . \$1.50
  - Class II- Above combination, & Jarlibro (a directory of World Esperanto) added 2.75
  - Class III Above combinations & the monthly magazine "Esperanto" (\$1.75) added 4.50
- Come in any time-Your year begins the date of your receipt. (instead of Oct. 1st as formerly) (EANA with "AE" \$1.50) (Jarlibro, additional \$1.25) ("Esperanto", additional \$1.75) (Total \$4.50)

- \*\*\*\*\*
- TEXTBOOKS Dr. Reed's "Practical Grammar" - A course suitable for all grades 75¢  
Prof. Kenngott's "Esperanto Course" speaks for itself- and teaches you. 1.00  
(The authors of both above courses are recognized as World Authorities on the Language)
- Prof. Kenngott's Pocket Dictionary - Two-way. A worthy companion to any course. 25¢  
Froding's "Easy Course in Esperanto" - a splendid 'starter' of 8 lessons. 10¢  
Sussmuth's "American Esperanto Key" - Alphabet, grammar and vocabulary. 5¢  
"Edinburgh Dictionary" Esperanto-English, English-Esperanto 288 pp. 4 x 6, \$1.00  

<u>Esperanto-English by E.A. Millidge. The BEST Esperanto Dictionary in any National Language. 500 pp. Price \$ 2.75</u>	<u>English-Esperanto by Joseph Rhodes, a useful companion to the Millidge. Postpaid \$ 1.10 (547 pp.)</u>
--	---

Easy-and interesting reading: "Fablej de Ezopo" 25¢, "Zamenhofa Legolibro 50¢, "Esperanto for the Globe-Trotter" (Eng.) 5¢ "Sub la Meznokta Suno" 25¢, "Sep Ridoj" 25¢ Ĉiutaga Vivo (Kengott) 25¢

\*\*\*\*\*  
Copies of this issue of "AE" will be sent to any address-- U S or Foreign-- for 15¢ silver, clean stamps, or 3 respndkuponoj.